


Jen mapeto pri la situo de CER-ES en la kvartalo *San Giuliano Mare* de Rimini. Ĝi estas nura skizo kaj montras nur iom gravajn stratojn. Ne dependu nur de ĝi por via orientiĝo.

Ne miru, ke aliaj urbomapoj de Rimini parte orientiĝas tiel, ke nordo estas dekstre malsupre.



-  – CER-ES, via Giovanni Briolini, 48 (44,07057 N; 12,56522 E)
- SG – preĝejo de Sankta Juliano, la loka patrono
- SJP – preĝejo de Sanktaj Johano kaj Paŭlo, kun mozaikoj en la itala kaj Esperanto

Publika trafiko en Rimini. Tra *via Coletti* iras la aŭtobuso n-ro 4 (Marebello – urbo-centro – stacidomo – Via Coletti – Torre Pedrera – San Mauro Mare). Ĝi veturas ĉirkaŭ kvin minutojn de la stacidomo al *via Coletti* kaj labortage trafikis ĉiujn 15 minutojn. La haltejoj estas numeritaj; la stacidomo estas numero 4, *via Briolini* situas meze inter la numeroj 7 kaj 8. La retejo de la buskompanio de Rimini estas <http://www.amrimini.it/>.

Inter la du bordoj de la haveno funkcias prameto (nur por personoj). Ĝi navedas inter la lumturo kaj la kontraŭa bordo.